# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Bartoloměj Daniel (1924 – 2001), la esperantisto

Bartoloměj Daniel estis romao, kiu krom rusa kaj germana lingvoj memlernis esperanton, sciis ĝian signifon kaj propagandis ĝin inter siaj gekolegoj. Li devenis el malriĉa familio, kiu loĝis en Šaštín (Slovakio). Lia vojo al klereco ne estis facila, sed danke al sia talento kaj forta volo li sukcese studis en Karola Universitato en Prago kaj fariĝis la unua romaa promociita historiisto en tiama Ĉeĥo-slovakio (1956). En la jaroj 1969-1973 li estis agema membro de Asocio de Ciganoj-Romaoj de ĈSR. Li ekpreparis fondadon de Muzeo de Romaa Kulturo, por kiu li kolektis tradiciajn romaajn metiistajn produktojn kaj aliajn eksponaĵojn. En la jaro 1970 li en Moravia Landa Muzeo aranĝis unikan ekspozicion pri romaa forĝado. Post neniigo de Asocio de Ciganoj-Romaoj li laboris en diversaj laboristaj profesioj. Al faka laboro de historiisto li povis reveni nur post la jaro 1989. En la jaro 1991 li kunfondis Muzeon de Romaa Kulturo en Brno, en kiu ĝis fino de sia vivo laboris kiel historiisto. Bartoloměj Daniel verkis ne nur fakajn artikolojn kaj libron pri historio de romaoj, sed ankaŭ poemojn en okcidentslovakia romaa dialekto.

**Kiam:** la 1-an de aprilo 2026 je **18.00** (UTC+2), la klubejo estos malfermita ekde 17.45

**Prelegonto**: Oldřich Arnošt Fischer
**Lingvo:** esperanto
**Kie:** Občanský klub, Hybešova 65a, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la . La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

Ĉeesta renkontiĝo, ĝi estos registrata.

## Ni rekomendas

- La 22an — 25an de majo 2026, Germana-ĉeĥa renkontiĝo, Olomouc. Informoj venos baldaŭ.
- La 6an de junio 2026 Ludu kun ni!, Brno,
- La 7a — 21a de junio 2026 Unua Tanzania-Esperanto-Safaro, Tanzanio
- 23an-26an de julio 2026 43-a Pola Esperanto-Kongreso, Bielsko-Biała, Pollando.
- La 1-an — 8-an de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio

Ĉu vi scias pri esperantista programo, precipe internacia, kiu povus esti interesa por ni? Informu nin.

## Cetera programo en aprilo

La 8an **Okulfrapaj ornamaĵoj - rakonto pri mozaikoj** – Ewa Caban. *Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom*, je la 19a h.

La 15an **Tabloludoj**, *klubejo*

La 22an **Moderna propagando, informa militado kaj protektado kontraŭ ĝi - enkonduko** – Josef Kalčík, *rete per Jitsi, je* **18.30**

La 29an **Roko Stránská en Brno** – Milan Kolka*, klubejo*

## Programo en majo

La 6an **Nia retbutiko**, *rete per Jitsi, je* **18.30**

La 13an *Ankoraŭ neagordita, klubejo*

La 20an *Ankoraŭ neagordita. Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.*

La 27an *Ankoraŭ neagordita, klubejo*

Kiel vi vidas, en majo ni apenaŭ havas programon. Kaj estas nia vico kontribui al komuna reta renkontiĝo kun glivicanoj.

En junio restas nur decidi, kion ni faros la 24an, ĉar la rostumado okazos jam la 10an de junio.

Dankon


## Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic



Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

SENT BY mailerlite